

esperanto aktuala

Revuo de la Esperantista Brusela Grupo

Numero 3 / 2015





La Semo



La 10an, la 11an kaj la 12an de Julio, venu festivali kaj helpi la volontulojn en la asocia vilaĝo de la festivalejo «La Semo» por reklami pri Esperanto kaj la Verdaj Skoltoj !




<http://www.lasemo.be>
<https://verdajskoltoj.wordpress.com/lasemo-10-1207/>



K O L O F O N O

40a ELDONJARO. **Redaktoroj** : Laurent kaj Samy Loisse : aktuala@esperantobruselo.org ;
 Fondita en 1976, de Léo De Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la
 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo «Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge» kun la n° 0419498274, honorigita
 kiel reĝa societo ek de la 29a de Majo 1957. **Aktuala estas libere elŝutebla tie** : <https://sites.google.com/site/ebgaktuala/>
Prezidanto : JM Nicolas de BUYL : prezidanto@esperantobruselo.org ; **Kasisto** : Jan Amadori jan.amadori@gmail.com
Sekretario : Laurent Loisse sekretario@esperantobruselo.org , **Informoj / kursoj** : Françoise Pellegrin fransuaz@esperantobruselo.org
Eventoj : JM Nicolas de Buyl nikolao@esperantobruselo.org **Retejo de EBG** : www.esperantobruselo.org
Abona membriĝo : 10 aŭ 13 eŭroj jare, konto : **IBAN** : BE87 5230 8055 0794, **BIC** : TRIOBEBB de la Esperantista Brusela Grupo
Kunvenejo : rue Van Maerlant 2, 1000 Bruselo Metroo Maelbeek ĉiumerkrede 18h30-20h00 - Tie nek poŝtkesto, nek telefono .
 Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala ne nepre spegulas opiniojn de la ĉefa redaktoro aŭ de EBG - Esperantista Brusela Grupo

A G E N D O



Bonvolu kontroli la ĝisdatigojn sur nia nova retejo : www.esperantobruselo.org

Kursoj kaj kunveno okazas ĉiumerkrede en nia kunvenejo en la konstruaĵo de la Eŭropa Komisiono,
 Rue Van Maerlantstraat 2, 1000 Bruselo.

Novuloj, bonvolu sin anonci al fransuaz@esperantobruselo.org aŭ telefone +32 2 358 27 28

EBG faras alvokon al prelegontoj por plenigi sian kalendaron,
bonvolu kontakti nikolao@esperantobruselo.org aŭ vespere 0478 382 981

MAJO

De Vendredo la 8a ĝis Dimanĉo la 10a	Semajnfina renkontiĝo PEKO por ĉiuj Domaine de Mozet, rue du Tronquoy 2, 5340 Mozet https://verdajskoltoj.wordpress.com/peko-eo/
Lundo la 11a	19:00 - 21:00 Babilemaj Spagetoj ➤ Paĝo 18
Merkredo la 20a	18:30 - 20:00 Prelego : Marcel Delforge «Karloreĝo, granda kaj malgranda Historio»

JUNIO

Merkredo la 3a	18:30 - 20:00 Prelego : Bernard-Régis Larue pri "Impresoj de turisto en centra Indonezio"
Sabato la 6a	14:00 - 16:00 Konversacia rondo en Dilbeek Lydia Buyst : 054 33 01 51 http://www.esperanto.be/lokgrup.php#Dilbeek
Lundo la 8a	19:00 - 21:00 Babilemaj Spagetoj ➤ Paĝo 18
Merkredo la 17a	18:30 - 20:00 Prelego : Marc Démonthy pri "Kial, kiam, kiel, kie kantas niaj komunaj birdoj?"
Merkredo la 24a	18:30 - 21:00 Sezonfina vespermanĝo ĉe loko difinenda

JULIO

De Vendredo la 10a ĝis Dimanĉo la 12a	Muzikfestivalo «La Semo» http://www.lasemo.be/#
De Vendredo la 17a ĝis Sabato la 25a	48a ILEI-Konferenco en Ostende kaj vizito de Bruselo) http://ilei.info/
De Sabato la 25a ĝis Sabato la 1a	100a UK en Lille http://www.lve-esperanto.org/lille2015/

Saluton Kara Legantaro !


Tempo flugas tiel rapide ! Post nelonge, amasoj da esperantuloj renkontiĝos dum la centa Universala Kongreso en Lille. Jam aliĝis ĝis nun 2 290 homoj el 77 landoj !

Alia grava rendevuo por muzikemuloj: ĉi-jare, la Verdaj Skoltoj partoprenos en la muzikfestivalo «La Semo» kiu okazos de la 10a ĝis la 12a de Julio. Kiel 2 jaroj antaŭe, Valer (el la Verdaj Skoltoj) havos budon en la asocia vilaĝo (kiu nomigas «Agi Kune», en Esperanto ! 😊), por kompreneble reklami pri nia plejŝatata lingvo ! Via helpo estos bonvenigata !

Bonan legadon al ĉiuj !

Viaj redaktoroj

aktuala@esperantobruselo.org



Enhavo

- Paĝo 2 : La Semo
- Paĝo 3 : Kolofono kaj Agendo
- Paĝo 4 : Edito kaj Enhavo
- Paĝo 5 : Annie Grente instruas en Tunizio
- Paĝo 6 - 7 : Pripensoj de Aleksandra
- Paĝo 8 : Intervjuo unu, Delfeno el la Verdaj Skoltoj
- Paĝo 9 : DJ Bruselo, el Bruselo
- Paĝo 10 - 11 : La Oka Pordo
- Paĝo 12 : La Unua de Majo
- Paĝo 13 : Vojaĝo per bicliko tra la mondo
- Paĝo 14 - 17 : Lingvaj Festivaloj kaj Merkatiko
- Paĝo 18 : Babilemaj spagetoj
- Paĝo 19 : La unua instruado de Esperanto en Maroko!
- Paĝo 20 : La ciklo de akvo



Annie Grente instruas en Tunizio

Annie Grente, francino, (NdlR: membro ĉe Edukado.net) finstudinto en la instruista trejnado en Poznan, raportis pri sia nuna agado en Tunizio.

"Dum mia vojaĝo en Tunizio mi gvidas kvintagan kurson por prepari grupon de lokaj junuloj al la **Monda Socia Forumo ĝis (24/03 ĝis 28/03) en Tunizo**, kie ni prezentos Esperanton kaj iomete instruos kaj al **la 8-a Mezorianta kaj Nordafriko kunveno**, kiun UEA (Renatto Corsetti) organizas en Hamameto de la 28-a ĝis la 2a de Aprilo.

En la nuna kurso estas pli-malpli 10 personoj. La materialo, kiun ni uzas, preparis mi mem, ĉar la celo estis kaj estas, ke ili komencu komuniki en Esperanto kaj povu bonvenigi la gastojn en la kunveno. Mi instruis pri tio kiel paroli pri tempo, kiel prezenti sin, numerojn, pri manĝoj kaj manĝaĵoj kaj similaj bazaj kaj praktikaj temoj.

Eble vi ŝatus sendi mesaĝon al miaj novaj disĉiploj?
Estus bone, se ili vidus, ke vi apogas ilin!

La mesaĝojn bv. lasi en Facebook ĉe la ligo al la [Tuniza Esperanto grupo](#) aŭ sendi al mia adreso ([anniegrente\(ĉe\)hotmail.fr](mailto:anniegrente(ĉe)hotmail.fr)), por ke mi povu pludoni ilin al la grupo. Antaŭdankas vin:

Annie Grente el Tunizio (Marto 2015)



Pripensoj de Aleksandra ...



Ĉu vi scias, kial en Esperantujo ekzistas relative malmultaj originalaj esperantaj kantoj? Mia respondo estas: ĉar ni ne volas havi ilin.

Vi eble nun pensas: kial? Kompreneble mi volas! Mi volas iam malfermi fejsbukon, jutubon aŭ ion ajn, kaj trovi tie subite profesie faritan, belsonan, mirindan esperantan kanton kiel tiuj anglalingvaj, kiujn mi trovas en radio! Sciu, sen via helpo tio ne okazos.

Lasu min klarigi.
Por komenci de la plej komenco, ne ĉiu povas fariĝi muzikisto. Granda parto de ni (inkluzive de mi) unusolan, kion scipovas fari pri muziko, estas aŭskulti.
La due granda parto scipovas kanti, eble ludi gitaron, eble pianon, aŭ ion alian, sed ne havas tempon aŭ monon por serioze okupiĝi pri tio.
Kaj eĉ inter muzike talentaj homoj ne ĉiuj kapablas krei originajn kantojn.

Aldone, por krei originajn kantojn ekde la ideo ĝis la plena formo, necesas havi aŭ grupon da talentaj kunlaborantoj, aŭ taŭgan ilaron.
Tio kostas. Oni bezonas ankaŭ dediĉi multe da tempo por registri, ofte plurfoje, aldoni muzikilojn, redakti ktp.

Kompreneble aldoniĝas neceso krei esperantan tekston, akompanantan filmeton kun subtekstoj ktp, aŭ iun, kiu kapablas kaj emas fari tion por ni.

Ĉu tio indas? Honeste? Tute ne!
Kanti tradukitajn kantojn estas ne nur pli facile.

Oni ankaŭ povas multe pli facile plezurigi aŭskultantaron per la kanto jam konata. Por ke homoj ekŝatu la kanton, bezonatas, ke oni havu ŝancon aŭdi ĝin plurfoje. Scias tion profesiaj manaĝeroj, kiuj lasas nin aŭdi "vole nevole" kantojn plurfoje en radio ktp., antaŭ ol ni mem konstatos, ke la kanto estas bona.

Kompare kun tio la esperantista muzikkreanto havas kutime nur unu ŝancon.

Ni klikas ligon al la muzikero, aŭskultas la komencon, kaj se ne tuj plaĉas al ni, ni lasas. Kaj ne plu interesiĝas pri tiu homo (aŭ grupo).

Kaj dume homoj ja havas kapablon evolui. Se oni havas sufiĉe da kuraĝigo kaj subteno, oni klopodos lerni.

Eblas, ke la sama homo, kies kanto ne tre plaĉis al ni, kun nia kuraĝigo kaj pozitiva kritiko kreos sekvontan multe pli bonan.

La fama muzikisto lavis siajn ŝtrumpetojn





Ĉiuokaze homoj, kiuj klopodas fari esperantan muzikon estas niaj raraj trezoroj, ni ne povas permesi al ni senkuraĝigi ilin!

Antaŭ kelka tempo mi esploris la reton pri esperantaj muzikeroj. Mi trovis homojn, kiuj aperigis du, tri kantojn kaj rezignis. Mi tute ne surpriziĝas. Mi daŭre trovas ankaŭ homojn, kiuj plurfoje aperigas siajn kantojn tien kaj alien, sed ne multaj interesiĝas, ne multaj kuraĝige komentas...


Lastatempe bonegan iniciaton faris la revuo Kontakto kun sia konkurso. Aliĝis multaj talentuloj, eĉ mirinde! Sed la premion ricevis nur unu kanto. Kio pri la resto? Ĉu la aŭtoroj ricevis iun kuraĝigon? Ĉu iuj kontaktiĝis kun ili por helpi evoluigi ilian talenton? Laŭ mia scio ne...

Mi mem havas sperton kunlabori pri esperantaj kantoj. Kaj jes, troviĝis kelkaj homoj, kiuj tre helpis kaj kuraĝigis nin (i.a. Roberto de Esperanto TV kaj Veronika de Muzaiko) kaj ni estas tre dankemaj pro tio. Plejparto tamen estas tute indiferenta...

Bonvolu memori, eĉ se vi tute ne havas talenton pri muziko, estas vi, de kiu dependas la estonteco de la esperanta muziko.

La du-tri minutoj, kiujn vi dediĉas por aŭskulti kanton, eĉ se ĝi tute diferencas de la anglalingvaj hitoj kaj via imago pri tio, kiel devas esti kanto, via klako "mi ŝatas", afabla komento, diskonigo (eĉ se nur sur via fejsbuka muro) - ĉio ĉi ege gravas! Kaj precipe ĉar esperantistaj muzikistoj principe ne mongajnas per sia laboro, nur faras ĝin por satisfakcio, la maniero de tio, kiel ili estas akceptitaj de ni - estas por ili ĉio!

Aleksandra Watanuki



El la Verdaj Skoltoj : Intervjuo unu, Delfeno

1) *Saluton, kiu Vi estas? El kiu urbo/lando Vi venas?*

Mi estas Delfeno! Sed ekster la skolta grupo mi nomiĝas Pjotr. Mi estas dek ses jaraĝa.

Mi loĝas en Antverpeno kaj mia ĉefa lingvo estas la nederlanda. *[Pjotr parolas ankaŭ la rusan.]*



2) *Ekde kiam Vi partoprenis la verdajn skoltojn?*

Jam dum pli ol du jaroj mi estas Verda Skolto. Do mi aliĝis kiam mi havis dekkvar jarojn.

3) *Ĉu la lingvoj estis problemo?*

Ne, mi jam parolis Esperanton flue, kaj povis uzi la francan kun aliaj kiuj ankoraŭ ne konis Esperanton bone.

4) *Kion Vi ŝatas ĉe la verdaj skoltoj?*

Miajn geskoltojn!!

4) *Ĉe la skoltoj, Vi estas kun alilandanoj, ili parolas alian lingvon, havas alian kutimon...*

Ĉu neniam okazis problemo? Aŭ miskompreno? Rakontu!

Okazis miskomprenoj, sed ne problemaj, nur malgravaj, kiuj povas esti ege amuzaj.

5) *La skoltoj memzorgas kaj vivas aventurojn. Rakontu iun belan / interesan / memorindan aventuron kiun vi travivis ĉe la skoltoj!*

Dum somera tendumado de 2013 ni kajakis. Estis bela vetero, sufiĉe varma. Dingo, Korsako kaj mi ne timis do riski falon, stariĝante en la malekvilibra kajako. Jes, ni falis, kaj tamen daŭris surprize longe antaŭ ke ni sekiĝis. Dingo rimarkis kelkajn horojn poste: "Mi vere ankoraŭ sentas min malseka", je kio Lupo atentigis lin: "Jes, cetere, en Belgio la akvo estas malseka!".

Eble tio estis kultura miskompreno... *[rimarko: Dingo estas franco kaj Lupo, valono, do normale ne devus estis kultura miskompreno inter ili!]*



"mi ne prenas miajn akvajn vestaĵojn ĉar mi ne falos"

6) *Kiel oni diras "ĝis revido" en viaj lingvoj?*

"Tot ziens", sed pli uzata: "Daaaaaag!"
"до сведения", aŭ pli uzata "пока пока"

Daaaaaag! Delfeno, kaj ĝis baldaŭ ;-)



<https://verdajskoltoj.wordpress.com/2015/03/27/intervjuo-unu-delfeno/#>

DJ Bruselo, el Bruselo

«Esperanto estas miksaĵo de lingvoj» klarigas la DJ Bruselo en video sur YouTube*.

Kiel albandevena loĝanto de Bruselo li estas sufiĉe konata dj-artisto en Bruselo kaj Flandrio.

En tiu video li klarigas (angle) pri la elekto de la esperantlingva nomo « Bruselo » :

« ...ne nur pro mia rilato al Bruselo (ĉefurbo de Bruselo), sed ankaŭ pro la diverseco de muziko en la mondo » .
Li opinias ke nuntempe dominas en la mondo komerca muziko. « Tiom da muziko en la mondo ekzistas kaj restas nekonata » laŭ li.

Tial li volas konigi al la publiko aliajn muzikojn ol nur la klasikajn ĝenrojn. Lia muziko enhavus kaŝitajn sociajn kaj politikajn mesaĝojn. « Pere de tia muziko mi povas atingi homojn alimaniere, tion vi povas vidi », li diris.

*Spektu la filmeton sur:


<https://www.youtube.com/watch?v=FC5IU8iL8Ac>

Sub lia vera nomo « Bleri Lleshi » li estas ankaŭ estas filozofa, politika sciencisto, dokumenta filmisto kaj verkisto de libroj rilate al identeco kaj interkultureco. Li pledas por diverseco, plureco de kulturoj : konservi kaj samtempe fortigi la plej bonan el ĉiuj kulturoj. La mondo rapide ŝanĝas kaj same kulturo ŝanĝos.



Kultura ŝanĝo baziĝu sur interŝanĝo, rekontiĝo, dialogo, rekono kaj aprezo de divesecoj.

Por tio ni bezonas malfermecon de la menso kiu implicas la ĉirkaŭbrakumadon de inspiroj kiuj devenas de diversaj konvinkoj.



Bloĝoj : <http://blerilleshi.wordpress.com> · <https://www.facebook.com/Bleri.Lleshi>




Eble oni invitu lin al UK en Lille aŭ al iu IJK, SES ?

Kontakto : DJ Bruselo konktakeblas per djbruselo@gmail.com aŭ pere de Facebook. Twitter [@blerilleshi](https://twitter.com/blerilleshi)

Ligo :
Groovalicious video > <https://vimeo.com/86317667>*

La oka pordo 2/4

UNUA SCENO: "EN SUBGRUNDO" (*daŭrigata*)



BES: Atendu momenton, por ke mi rememoru kelkajn gravajn aferojn... (*sono: butonoj de komputono*) Hmm... Estas skribite en la sankta libro pri leĝoj, ke la transpasontojn nepre akompanas magiaj statuetoj...

AIDA: Mi alportis al vi miajn pupojn. Mi supozas, ke ilin vi povus uzi kiel magiajn statuetojn, ĉu ne?

BES: Kompreneble, ili perfekte taŭgas... hmm... Mi daŭrigu la legadon: "La transpasontoj devas kunporti lanternojn, kukojn, ludilojn, florojn..."

AIDA: Mi alportis korbeton kun donacetoj por vi, Bes!

BES: Bone. Mi nur devos multoblige la aĵojn, sed tio por mi estos bagatelo... Gekaruloj, nia vojaĝo ne estos sendanĝera... Ni devos transpasi 7 pordojn kaj venki ĉiufoje en la danĝera ludo de la pordoj...

AIDA: Danĝera ludo?

RADAMES: Kiom danĝera?

BES: Ne timu, mi helpos vin pri tiu ludo. Mi estas Bes, la plej sperta fakulo pri ludoj en la ĉielo samkiel sur la tero... Poste, oni atingos la sunan salonegon de la ĉiopova Ra. Sed la lasta parto de la vojaĝo estos jam bagatelo. Ek al la laboro! Unue, vi vivigu la pupojn.



RADAMES: Ĉu ni?

AIDA: Kiel ni? Ni... ne scipovas...

BES: Vi ja scipovos, ĉar mi helpos vin. Vi devas kanti, ĝis la pupoj viviĝos...

AIDA: Kio? Sed... sed mi ne talentas pri muziko...

RADAMES: Mi tute ne scipovas kanti...

BES: Bagateloj! Ajna infano kapablas kanti. Vi ja kantis kun mi en via infanaĝo, ĉu ne?

AIDA: Sed ekde longe ni ne plu kantis...

RADAMES: Ni ne plu kapablas kanti...

BES: Ne zorgu! Mi estas Bes, la dio de ĝojo! Mi inspiros viajn korojn, samkiel mi faris kiam vi estis infanoj... Pensu pri viaj vivoj, pri viaj plej belaj spertoj, pri viaj plej bonaj deziroj. Pensu tiele, kaj mi kapabligos vin kanti. Viaj animoj ekbrilos en viaj manoj kaj la pupoj viviĝos. Nur fidu min kaj... kantu! (*flustras*) La dioj pli multe aprezos viajn klopodojn ol viajn realigojn. Kantu! Ek!

RADAMES: (*kantas*) Ĉiela Aida, formo dieca,/ mistika fasko de lum' kaj flor',/ de mia penso vi estas reĝino,/ vi de mia vivo estas la splendor'.// La belan ĉielon mi volis redoni,/ la dolĉan brizon de via patruj',/ sur viajn harojn kronon surmeti,/ doni al vi tronon apud la sun'.

AIDA: (*kantas*)

Ĉiela Radames, kuraĝa kaj saĝa,/ mistika miksaĵo de bel' kaj bon',/ de mia penso vi estas reĝo,/ vi de mia vivo estas la splendor'.// La belan ĉielon mi volis kundividi,/ la dolĉan brizon de mia patruj',/ sur viajn harojn kronon surmeti,/ doni al vi tronon apud la sun'.

[*La kantado finiĝas.*]

AIDA: La pupoj viviĝas! Mi aŭdas ilin... Ili enspiras... Ili aŭskultas... Ili nun ridetas... [*sono: aplaŭdoj*] Ili aplaŭdas!

RADAMES: Miraklo! La pupoj volas helpi nin dum la vojaĝo! Dankon, dankon...

BES: Bonvenon, magiaj statuetoj! Nun ni pretas komenci la vojaĝon...


FINO DE LA UNUA SCENO



Luiza Carol

<http://members.aon.at/aldone/retradio/>

<http://www.luch.co.il/luiza/>



Okaze de tiu nova 1-a de majo, mi opinias ke estus bone konigi aŭ rememori al niaj legantoj kiaj viroj estis tragike je origino de la elekto de tiu dato kiel internacia tago de postuloj.

La dato 1-a de majo 1886 estis fakte elektita kelkan tempon antaŭe fare de la du grandaj usonaj sindikatoj, [IWPA](#) kaj [AFL](#), por giganta naciskala strikmovado se la ok-hora tago ne estos akirita antaŭ tiu dato. Ili jam bataladis de longe por tio.

La dramo okazis en *Ĉikago*, kie la estraro havis fortan drastan reputacion. Kvankam nenio okazis ĉi tiun 1-an de majo 1886 en *Ĉikago*, ses strikantaj laboristoj estis mortigitaj de la polico la postan tagon. Dum la protesta mitingo kiu okazis la saman tagon, provoka agento ĵetis bombon inter la ĉeestantojn. Tiu evento estis la preteksto al unu el la plej kruelaj represioj pri kiuj estis viktimo la laborista movado.

Justico falis sur la plej famajn aktivulojn.

[Spies](#), [Fielden](#), [Schwab](#), [Engel](#), [Fischer](#), [Lingg](#) kaj [Neebe](#) estis kulpigitaj pri konspiro kaj murdo.



Kvin el tiuj aktivuloj, ĉiuj anarkiistoj, estis mortokondamnitaj.

Lingg ne atingos la pendumilon, li memmortigis sin en sia ĉelo. La kvar aliaj estis pendumitaj la 11-an de novembro 1887.

<https://vimeo.com/125454789>

<https://www.youtube.com/watch?v=BykZNnrKpNA>

<http://neniammilitointerni.over-blog.com>



Vojaĝo per bicliklo tra la mondo de Cirilo kaj Roz'



Barato

28/8 -> 2/10/2009 - 1232 km (10074 km)

▷ Kaj ne nur bovoj videblas sur la aŭtoŝoseo. Ankaŭ troveblas etaj butikoj, hartondejoj (necesas nur seĝo, tondilo kaj spegulo), ludantaj infanoj, sekiĝantaj vestoj aŭ bovfekaĵoj sur la randomureto el betono antaŭ ol utili kiel brulaĵo, kaj multaj aliaj aĵoj ne imageblaj en Eŭropo, kiel paneintaj kamionoj flikataj side sub la framo sur la trafiktrako.


En la urboj, bovoj malpli bonŝancas ol sur la aŭtoŝoseo. Ne estas herbo, ili do manĝas la restaĵojn de la restoraciaj manĝaĵoj kaj putrajn fruktojn ĉie ĵetitajn surstraten pro manko de rubujoj. Nokte, ili dormas surŝosee, meze de la bruo de senĉesa irado. La stratoj fakte plenas je bo-vaj laksaĵoj, kiujn oni prefereble preterpasu.

En Gorakhpur ni ankaŭ vidis bovon surgenuiĝi por peti nutraĵon front' al vendejo, kaj tio funkciis. Kaj en Benareso alian butikumante en vestovendejo. Jen plia viktimo pro modo!

La vojo post Benareso fariĝas aĉa. Dum en Francio truetoj en la ŝosea asfalto oni kromnomas kokinonestoj, eblas diri, ke en Barato ni trafis strutonestojn!

Bicikli en Barato estas granda sperto, ni eĉ dirus granda eksperimento. Ni tamen sopiras al Nepalo, ĉar tiom da homoj ĉie, da bicikloj, da ŝargveturiloj, da ĉiama bruo tagnokte, tiom da malpurajhoj kaj da humida varmeco fine fariĝas sufokaj.

daŭrigota



Lingvaj Festivaloj kaj merkatiĝo: Vojaĝo de provlecionoj al landaj televido

Mia promenado tra la lando de Lingvaj Festivaloj iasence komenciĝis en la jaro 1994 en Francio kiam Marko kaj Daniela Noulin de la urbeto Vendôme invitis min prelegi pri Esperanto en la kadro de ilia longdaŭra ekspozicio pri nia universala lingvo.



Marko telefonis al mi, petante min fari paroladon al vizitantoj de tiu ekspozicio pri Esperanto, por ke poste homoj aliĝu al kurso de Esperanto. Mi respondis pozitive al Marko, sed ankaŭ sugestis al li, ke ni starigu serion da provlecionoj, kiuj okazos ĉiuhore, por altiri homojn al la posta prelego kaj por konvinki ilin enskribiĝi en la postaj kursoj de Esperanto. Marko konsentis pri tiu nova ideo, kaj mi komencis prepari la provlecionojn. Nun, du jardekojn poste, ankoraŭ aktive utiligas Esperanton homoj, kiuj eksciis pri nia lingvo en tiuj fulmokursoj en tiu franca vilaĝo: bela monro de merkatika efiko pri informado kaj varbado.

La ideo starigi provlecionojn en Esperantujo tute ne apartenas al mi. Mi lernis pri tiuj fulmokursoj jardekon antaŭe pro konversacio, kiun mi havis kun Jozef Horvath en lia loĝejo en Budapeŝto en

1983. Horvath estis speciale kompetenta kaj tre sperta hungara instruisto de Esperanto, kiu tiutempe laboris kune kun alia esperantisto nomata Rados, se mi bone memoras. Mi starigis la demandon al Horvath kaj Rados, kiamaniere ili altiris tiom multe da homoj por eklerni Esperanton en sia urbo, kaj ili parolis pri multaj provlecionoj por ekinteresi homojn pri Esperanto. Provlecionoj, sinsekvaj, dum tuta tago. Provlecionoj, sinsekvaj! La sama leciono, tamen ĉiam prezentata al malsama celgrupo. Simpla, senkosta, nealtruda, bela maniero varbi por nia lingvo. Jen merkatiĝo aplikata al nia afero, mi pensis tiutempe. Dek jarojn post tiuj konversacioj en Budapeŝto, pensigis min specife pri la kreado de Lingvaj Festivaloj en Francio homo, kiu ne estis esperantisto, kaj fakte li mem tute ne pensis pri starigo de tiaj festivaloj. Tiu homo ĉeestis la foiron de Majo de la urbo Tours en Francio, kaj, hazarde vidante la fulmokursojn kiujn mi starigis ĉe la Esperanto-budo en la foiro, li post ekprovo mem de la provleciona sistemo, demandis al mi, ĉu mi povus helpi al li krei novajn lingvokursojn.

La demando tute ne estis pri Lingva Festivalo nek provlecionoj, sed pri pedagogio, kaj pri varbado al lingvaj kursoj. Mi diris al li, ke mi estas okupita, sed volonte trinkos kafon kun li en kafejo en la venonta semajno. Tiel okazis, kaj ni trinkis niajn kafejn dum tri aŭ kvar horoj, tiel interesa tiu homo estis!

La viro, kiu devenis de Afriko, kaj kies nomon mi bedaŭrinde ne plu memoras, antaŭe studis psikologion, sed li multe interesiĝis pri lingvoj, kaj volis enkonduki la instruadon de afrikaj lingvoj en Francio.

Kvankam mi forgesis, espereble provizore, lian nomon, mi bone memoras la lingvojn kiujn li volis instrui, instruigi: la svahilan, la lingalan, kaj iun lingvon nomatan sango, jes sango – tian nomon malfacile mi forgesos. Mi, post kvarhora interparolado, havis pedagogiajn kaj merkatakajn rekomendojn por li: unue, ke li iru al la internacia librovendejo de la urbo por provi trovi lernolibrojn pri tiuj tri lingvoj, kaj due, ke li kaj mi starigu provlecionojn pri la **tri** lingvoj, varbante por tiu evento, kaj poste proponante al la kursovizitantoj, elekti kurson pri unu el la prezentataj lingvoj por pli profunda studo. Li pensis, ke tiu ideo estas tre bona, kaj tiu kuraĝigo de li komencis pensigi min pri pli ampleksa afero, pri Lingvaj Festivaloj.

Intertempe, esperantistinoj Pirette Formen kaj ŝia patrino de la loka Esperanto-grupo de Tours, informis al Nadia Costes Keefe, kiu tuj informis min pri la kreado de nova, loka asocio, kiu eble kunligos la internaciajn klubojn de la urbo. Mi ĉeestis la unuan kunvenon kiel gasto, kaj diris al ili du aferojn:

Unue, la nomo, kiun iu proponis por la asocio, Touraine Sans Frontières (Touraine Sen Landlimoj) estis ege bona laŭ merkataka vidpunkto, ĉar alloga en la franca lingvo, facile memorebla, kaj priskribeca pri la esenco de la klubo.



Due, ĉe la fino de tiu kunveno, mi levis la manon kaj demandis: “Ĉu vi eble ŝatus prezenti la **lingvojn** de viaj diversaj kluboj al la ĝenerala publiko en festivalo, kiu daŭros la tutan tagon?” Mi estis preta fari la tutan organizadon: trovi instruantojn, trejni la instruantojn, organizi la horaron, ktp. La rolo de ilia asocio estus trovi ejon kaj varbi. Mi optimiste diris, ke mi pensas, ke ni povos trovi eble 10 aŭ 15 lingvojn kaj prezenti ilin per fulmokursoj, ĉar mi jam havis sperton tiurilate. Ili kredis, ke mi bone kapablis organizi, sed dubis ĉu eblis trovi tiom da lingvoj.

Tiel la unua Lingva Festivalo naskiĝis: 32 lingvoj kaj dialektoj, ĉirkaŭ cent fulmokursoj, matene, posttagmeze kaj fruvespere en unu sabato de marto en la jaro 1995. Entute ĉeestis la kursojn 789 homoj, kaj multaj radiostacioj, la regiona televido, kaj la regiona ĵurnalo bele kaj bone parolis pri la afero. En la tria jaro de la franca Lingva Festivalo, kun 82 lingvoj, 256 fulmokursoj, kaj ĉirkaŭ 3,800 kursanoj, la unua televid-ĵurnalo de la lando TF1 bele raportis pri al afero en la ĉefa novaĵoprogramo de la semajno, kaj ankaŭ alia nacia televido en pli longa programo. Krome, naciaj radioj en Francio, kiel Europe 1, informis longe pri la festivalo. Tiu origina Lingva Festivalo ankoraŭ daŭras. Bela, preskaŭ senkosta merkataka sukceso.

Tiuj unuaj Festivaloj en Francio bone servis por montri kelkajn vortojn kaj la nomon Esperanto antaŭ la okuloj kaj oreloj de la tuta lando. Milionoj da homoj aŭdis pri Esperanto pere de la grandaj televidoj, radioj, ĵurnaloj, kaj ili konstatis, ke Esperanto vivas, kaj en neniu de la raportoj estis negativaj vortoj pri nia lingvo. La publiko tutnature konstatis, ke Esperanto vivas, kaj estas normale, ke Esperanto ludu gravan rolon en Lingva Festivalo, ĉar

en Lingva Festivalo ĉies lingvoj estas bonvenaj.

[La Lingva Festivalo en Nankino estis la plej granda kaj populara lingva evento en la Internacia Jaro de Unesko pri Lingvoj 2008.]

Sur alia kontinento, same kiel en Eŭropo, la ĉinaj amaskomunikiloj abunde raportis pri la Lingva Festivalo de Nankino, kie pli ol 13 mil ĉinoj ĉeestis fulmokursojn pri ĉirkaŭ 65 lingvoj en 254 lecionoj. La unua ĉina festivalo rezultigis eble kvin televidajn programojn kaj naŭ ĵurnalajn artikolojn pri la festivalo, kaj Esperanto videblis multloke en la orienta Ĉinio kaj eĉ tutlande. Tio estas favora merkataka efiko rilate komunikadon, sed ankaŭ, pro la aktiva kunlaborado de la Esperanto-klubo, sinjorino Cui kaj sinjorino Wang, kaj la kunlaboro de sinjoro Peng – kune kun la eŭropanoj Aŭgusto Casquero de Hispanio kaj Michel Fontaine de Francio kaj lia edzino, ni ekinstruis Esperanton al 1461 studentoj kaj lernantoj (entute estis 18 Esperantaj fulmokursoj dum du tagoj), inter kiuj ĉirkaŭ 250 nankinanoj poste venis al pli longaj kursoj de Esperanto, kaj el kiuj 57 venis al longa, pagata kurso unu monaton poste. La esperantistoj, kiuj kunlaboris en tiu Lingva Festivalo de Nankino, poste starigis Esperanto-Insulon, la eksperimenton pri ponto-kunlaborado por instrui Esperanton al komencantoj kiuj devenas kaj de Eŭropo kaj de Azio, lernante Esperanton en la **sama** kurso. Do, ĉi tie oni vidas la merkatican efikon de Lingva Festivalo en la kreado de novaj kursoj, novaj esperantistoj kaj eĉ nova internacia eksperimento: Esperanto-Insulo.

La merkataka efiko de Lingva Festivalo pli bone videblas en la Lingvaj Festivaloj de Ruslando, kaj en la fundamenta kaj fonda laboro tie de Aleksandr Blinov. Laŭ miaj

konversacioj kun Aleksandr, en la unuaj jaroj de la Lingva Festivalo de Ĉeboksaro venis multege da novaj lernantoj de Esperanto **pro** la festivalo. Mi pensas, ke li eble ne listigis ĉiujn, sed en la unuaj jaroj de tiuj festivaloj centoj (ĝis unu mil) homoj, laŭ mia scio, **pro** kaj **post** la Lingva Festivalo aliĝis al kursoj de Esperanto. Tia aliĝado eble estas la plej bona sukceso en la historio de la Esperanto-movado en unu urbo. Sendube, la laboro de Aleksandr Blinov kaj la unuaj Lingvaj Festivaloj de Ruslando havis tre altan valoron merkatican, kaj espereble ni lernos de li, kaj de la bonegaj nuntempaj organizantoj de Lingvaj Festivaloj en Ruslando. Eĉ pli imponaj rezultoj povos veni de la tradicia festivalo en Moskvo, organizata de MASI kaj Irina Gonĉarova. Certe ni aŭdos pli da bonaj informoj de ili en venontaj jaroj. Parto de la ŝlosila sukceso-faktoro de Lingva Festivalo estas la lerta kunligado de fulmokursoj kaj postaj kursoj.

En mia Esperanto-vivo mi provis kaj reprovus ĉion, kion mi scias pri merkatico por logi homojn al Esperanto-kursoj: afiŝoj, prelegoj, budoj kaj standoj, ekspozicioj, malfermaj tagoj, reklamaĵoj, provoj kun amikoj, najbaroj, familianoj; lingvaj foiroj,



lingvoĉambroj, pagataj eventoj, senpagaj eventoj, intervjuoj en radio, intervjuoj en televido, artikoloj por ĵurnaloj, libro-elmontrado, retejoj, Youtube. Laŭ mia propra sperto, neniu el tiuj aktivaĵoj miaj havis signifan merkatan efikon, kompare kun tiu de la Lingvaj Festivaloj, kiam tiuj Lingvaj Festivaloj estas organizitaj por poste altiri homojn al Esperanto-kursoj kiel faris Aleksandr Blinov tiel sukcese en Ĉeboksaro. Multe el tiuj supre menciitaj eventoj, kiaj ekspozicioj, retejoj kaj similaj, kostas multe da mono, ekzemple, budo ĉe la Lingvofoiro Expolangues povas kosti inter mil kaj dek mil eŭrojn, sed, imagu, kara leganto, ke la Lingvaj Festivaloj kiujn mi organizis en Francio, Usono, Ĉinio, Japanio kaj Pollando kostis ege malmulte. La mono venis kelkfoje el mia poŝo, sed ĉiuj tiuj Festivaloj, eĉ la plej grandaj kiujn mi starigis kun inter 60 kaj 120 lingvoj prezentataj, inter 96 kaj 400 fulmursoj, inter 100 kaj 250 instruantoj, **kostas malpli ol unu ĉeesto al Universala Kongreso**. Malpli ol unu semajno da restado en mezluksa hotelo kaj du ekskursoj kun bankedo ĉe la Universala Kongreso de Esperanto.

Por starigi simplan, nemultekostan Lingvan Festivalon, la ĉefa afero estas unue trovi senpagan ejon – lernejon aŭ universitaton – kaj poste elspezi iom da mono por **multoblige** afiŝojn aŭ afiŝetojn por varbi. Se vi devas pagi por ejo, tio povas kosti multoble pli ol ĉiuj aliaj elspezoj kune. Do, trovu senpagan festivalejon! Ne metu ĝin en ekstera loko, ĉar tio estas lingva **foiro**, kaj tia aranĝo ne havas tiom da merkata valoro por Esperanto (legu [artikolon](#) tiurilate ĉe Libera Folio). Prestiĝa loko tute ne gravas; trovu ejon kun klasĉambroj, punkto. Forgesu prestiĝon kaj luksajn gvidlibrojn pri la Festivalo; ĉio tio ne helpas, (surprize, ĉu ne?), sed eĉ povas malgrandigi la merkatan efikon! Lingvoj

apartenas al la popolo, ne al la aristokratoj, nek al la novaj riĉeguloj de la nova kapitalismo. Samtempe informu la lokajn amaskomunikilojn, same informi per amaso da afiŝoj kaj fotokopioj, speciale en la universitato ĉe la fakoj pri lingvoj, historio, sociologio, psikologio, etnologio, ktp. Forgesu la fakon pri komerco kaj, paradokse, pri merkato; ili ne venos. Elektu bonan tagon. Trejnu la instruantojn. Poste vi havos pli da merkata efiko kaj je politika nivelo, kaj je novlernanta nivelo.

Lingvaj Festivaloj povas esti, do, la plej potenca kaj malmultekosta pozitiva informilo kaj varbilo pri Esperanto en nia nuntempa epoko. Ni starigu Lingvajn Festivalojn ĉe Universalaj Kongresoj, kiel mi rekomendis publike kaj rete jam en la jaro 1996. Ankaŭ ĉe Landaj Kongresoj kaj laŭeble ĉe lokaj kluboj kiel jam en Francio kaj Ĉinio. Kaj ni trejnu esperantistojn tra la tuta mondo starigi efikajn, simplajn, malmultekostajn Lingvajn Festivalojn. Tio povas esti unu el la plej fortaj merkatakaj paŝoj kiu ne estigos la malamikecan kontraŭstaron de homoj kaj politikistoj de Eŭropo kaj aliaj kontinentoj, sed kiu povas esti pli fervoran kunlaboradon de neesperantistoj kun esperantistoj.

Dennis Keefe

Universitato Florida Atlantic, Usono



La babilemaj spagetoj

Venu babili en Esperanto kaj manĝi kun samideanoj. «Pri kio temas ?», vi diros. Estas simple okazo por babaili ĉirkaŭ spagetplado (aŭ aliaĵo se vi ne ŝatas spagetojn).

**Lundon la 8an de Junio
ekde la 19a horo
en la restoracio «Garden City»
Place de la Liberté, 6, Vrijheidsplaats
1000 Bruselo**

Dum la printempo estas granda bela subarba teraso

Ne forgesu aliĝi ĉe

http://www.mlaitat.be/eskapadoj/?page_id=82

Tramoj 92,93. Busoj 29, 61, 63, 65. Metrostacio Madou



La unua instruado de Esperanto en Maroko !

Unuan fojon, de la 1a al la 10a de aprilo 2015, okazis iniciato por Esperanto en Casablanca, Maroko!

«Sunkompanianoj», Evelyne kaj Jean-Pierre, invititaj de la NRO "Blua Oranĝo Maroko", proponis instruadon al deko da homoj.

La kursoj disvolviĝis en spaca loko: *Complexe El Ghali* en Sidi Moumen, en fora ĉirkauaĵo de Casablanca.

En malriĉa kvartalo, tia nova, moderna « kulturdomo » prezentas ideon de disvolvado por marokanoj, tra muziko, danco, sporto, festo... kaj nun Esperanto!

En vigla etoso, ni disdonis la bazojn de la universala lingvo. Proksimume 10 homoj sekvis la kursojn, sed ne regule. Tamen, bunta estis la grupo, vidu : unu kameruniano, unu brazilano, francoj, marokanoj el diversaj regionoj. Ni elektis brazilan metodon «*Esperanto por lernantaj klasoj*» sufiĉe moderna, interesa ĉefe por gejunuloj. Kaj ni trafe elektis ĝin, ĉar en la grupo, junuloj serĉis apartamenton same kiel en la dua leciono de la libro!

Ni ankaŭ proponis ludojn, kanton, rolludojn, korpajn ekzercojn....

Ni ankaŭ bonŝancis renkonti Anass kaj Amal. Ili ĵus revenis piedirinte 5000 km ĉirkaŭ Maroko, kaj la paro intencas plilarĝigi sian piedmigradon tra Afriko post unu au du jaroj.

Esperanto tuj prezentiĝis kiel la mirakla ilo por komuniki kun tiom da diversaj etnianoj. Danilo, el Brazilo, konklude kaj dankeme, donacis al ni gajajn T-ĉemizojn, sur unu, li skribis «Instruisto» por Jopo, «Instruistino» por Evelyne, zorgeme skribis «La Espero» esperantista himno sur la sia, kaj «amiko» sur la aliaj!

Ĉiuj aprezis la malkovron de la simpla lingvo, kvankam ili konsciis pri la klopodoj por antaŭeniri!
Ili nun lernas per si mem dank'al la metodo Asimil.

Baldaŭ ni povos spekti filmeton pri la disvolviĝo de la staĝo. La grupo intencas starigi Esperantan klubon kaj nepre invitos la nuran esperantistaron de Casablanca, Lakbira, kiu komencis studi Esperanton en Ĉinio, sed ne havis, ĝis nun, ŝancon praktiki! La *Blua Oranĝo* celas Esperanton kiel sian ĉefan laborlingvon, eĥon de siaj ideoj pri universaleco en ĉiuj kampoj de sia aktiveco. Tiel, ni jam ĵetis la unuajn semojn en Burkino Faso en 2013, kaj revenis kun la grupo de *Nomad'kurso* en 2014. Kompreneble, ni kuraĝigas ilin, kaj «onidire», povus okazi ke ni revenos al Maroko, en aliajn urbojn por denove semi la verdajn semojn....



www.lorangebleue.org

fejsbuko : Hassan Aslafy / Evelyne Rotellini
sen forgesi niajn plej ŝatatajn agadojn
uneecoleautogo.jimdo.com / esperantoplus.jimdo.com
chu vi estas scivola? Kontakti nin :
sunkompanio@wanadoo.fr

SUNKOMPANIO, 1 La Place 09800 ARROUT - FRANCE
Tel : 05 61 96 82 08

Vi eble pensas ke ĉiu guto de pluvo, kiu falas el la ĉielo, aŭ ĉiu glaso da akvo, kiun vi trinkas, estas tute nova. Sed ĝi ĉiam estis ĉi tie kaj estas parto de la akvociklo.

La ciklo de akvo

La akvociklo funkcias danke al la energio, kiun provizas la varmigo de la suno.

La suno forvaporigas akvon el la oceanoj. Tiu nevidebla akvo-vaporo supreniras en la atmosfero, kie la aero estas pli malvarma.

La akvo vaporo kondensigas en nuboj.

Vulkanoj produktas akvo vaporojn, kiu formas nubojn.

Aerflujoj movas nubojn ĉirkaŭ la tuta planedon.

Akvo gutoj formiĝas en nuboj - kaj poste falas al la Tero kiel precipitaĵo (pluvo kaj neĝo).

En malvarmaj klimatoj, la precipitaĵo amasiĝas kiel neĝo, glacio kaj glaciveroj.

Neĝo povas fandiĝi kaj forflui en riverojn, oceanojn kaj teron.

Parto de la glacio iĝas rekta vaporo kaj iras en la aeron sen fandiĝi (sublimado).



Atmosfera

Kondensado

Vaporiĝo

Granda kaj planta vaporado

Forfluo

Oceanoj

Granda kaj planta vaporado

Planta sorbado

Fluo de subtera akvo

Konservado de subtera akvo

Precipitaĵo

Sublimado

Glacio kaj neĝo

Fandita neĝo

Riveroj

Nebulo kaj roso

Bestoj

Lagoj

Enfluo

Akvofonto

Enfluo

Reŝarĝado de subtera akvo

Fluo de subtera akvo

Konservado de subtera akvo

Pluvo sur la tero forfluas malsupren, provizante akvon al lagoj, riveroj kaj oceanoj.

Tom de la pluvo enfluas en la teron, kaj se ĝi iras surfice profunden ĝi reŝargas la subteran akvon.

Akvo el lagoj kaj riveroj povas enflui en la teron. Akvo iras en la teron pro gravito kaj premo.

Plantoj sorbas la akvon subteran kiu estas proksime de la tera surfaco.

Tom el la subtera akvo fluas en riverojn kaj lagojn. Kaj ankoraŭ povas enflui en la tera surfaco kiel akvo-fonto.

Plantoj sorbas subteran akvon per radikoj kaj el la folioj forvaporigas akvo.

Tom el la subtera akvo iras tre profunden kaj restas tie dum longa tempo.

La subtera akvo fluas en la oceanojn daŭrigante la funkciaĵon de la akvociklo.